Inclui suplemento em português

ISSN: 0871-9241

BOLETIM INFORMATIVO DA
ASSOCIAÇÃO PORTUGUESA
DE ESPERANTO

# NIA BULTENO

INFORMA BULTENO DE
PORTUGALA ESPERANTO ASOCIO

Rua Dr. João Couto. 6 r/c. A Tel 714 13 59 1500 LISBOA

JANUARO-MARTO 1994 JANEIRO-MARÇO Numero **63**



## Lisbono, oktobro 94:
## XV-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj

## Kolofono:

*Nia Bulteno* (informa bulteno de Portugala Esperanto-Asocio)

ISSN: 0871-9241

Numero **63** (jan.-mar. 1993)

**Direktoro:** Olga ALMEIDA
**Redaktoro:** António MARTINS
**kuntajpis:**
Werther SACRAMENTO
Georgina PEREIRA

**revizis** Gonçalo NEVES

**Eldonkvanto:** 350 ekzempleroj

**Komputile kompostita per** Aldus PageMaker™ **kun** *Publika*®, *Tempo* kaj *Orion* **kaj ofsetita per** Risograph 2500 **en** Associação dos Estudantes da Faculdade de Ciências de Lisboa

**Limdato por** ***NB*64**: 1994.05.20

# Enhavo

Kolofono .................. 2
Redaktora babilo ....... 3
PEJ rerenaskiĝas ....... 3
Expolíngua'94 .......... 4
Ĝenerala Asembleo ... 5
U.K. en Koreio ......... 7
Membrara statistiko .. 8
Leteroj de Régulo ... 10
Genealogio en e-o ... 11
Paronimoj ............... 12
Aranĝoj .................. 14
Alegre cavaqueira ... 16
T.V.-kurso .............. 18
Ekaj bebaj pepoj ..... 20
Libro-Servo ............ 21
Leter-Amikoj .......... 23
Bileto de senbarbulo .. 24
Malsamideano ......... 26
Kofro de la nepoj .... 27
QUOTA$ ................ 28

# Ĉi-numere...

vi trovos nenion pri Prof. Agostinho da SILVA, elstara filozofo kaj pedagogo, la plej tradukita portugala aŭtoro en esperanton, mortinta februare — prepariĝas detala artikolo pri li por la venonta numero de NB. Krome, vi ankaŭ trovos nenion pri nia honora membro Alberto Pedro da SILVA, kies membiografio, sekve de tiu de Manuel de FREITAS, ekpublikiĝos en *NB***64**.

## *PortugalaEsperantio:*

**Portugala Esperanto-Asocio**
✉ Rua Dr. João Couto 6 r/c A
P-1500 LISBOA

☎ +351 +(0)1 +714 13 59

**fakso:** +351 +(0)1 +793 36 04
**e-poŝto:**
b40@pteam.cc.fc.ul.pt.bitnet
jmm@zeus.ci.ua.pt.internet

**Fondita en** 1972.04.25
**Landa Asocio de UEA** ekde 1979
**Membraro** (94.05.16)**:** 253 anoj

*Gvidorganoj* (ekde 1993.03.06)

**Ĝeneral-Asemblea Stabo:**

**Prezidanto:** A. Correia COIMBRA
**Sekretarioj:**
Jaime CORREIA
Eusébio dos SANTOS
**Estraro:**

**Prezidanto:** M. Faria de BASTOS
**Vic-Prezidanto:** José MARTINS
**Sekretario:** Alcino ALVES
**Kasisto:** Francisco MELO
**Voĉdonantoj:**
Werther SACRAMENTO
António MARTINS

**Kontrol-Komitato:**

**Prezidanto:** A. da Silva ALMEIDA
**Revizoroj:** Fernando COSTA
A. Franco SIMÕES

***Neelektitaj Postenoj:***

**Instruado:** João SANTOS

**Libro-Servo:** A. da Silva ALMEIDA

**Biblioteko:**
Werther SACRAMENTO
**(periodaĵoj)** Ricardo TOSCANO
**(diversaĵoj)** *vakas*

**Eldonoj:**
**Libroj:** A. Franco SIMÕES
***Nia Bulteno*:** (vd. kolofonon)
***Esperanto—Língua Viva*:** (same)

**Gazetaro:** Alan ROMERO
**(eltondaĵoj)** Olga ALMEIDA

**Korespondpetoj kaj Fotoj:**
Georgina PEREIRA

**Turismo:** Ana CASTRO

**Filatelio:** Luís Filipe MARTINS

**Portugala Esperanto-Junularo:**
António MARTINS
Georgina PEREIRA
Ricardo TOSCANO

**Honoraj Membroj:**
Manuel de Sousa TEIXEIRA
Alsácia Fontes MACHADO†
Manuel de FREITAS
Alberto Pedro da SILVA
Herberto MIRANDA

**Landaj Reprezentantoj:**

**UEA:** A. da Silva ALMEIDA
**ILEI:** João SANTOS
**EEU:** M. Faria de BASTOS
**TEJO:** António MARTINS
**TEĴA:** Alan ROMERO
**SAT:** Alberto Pedro da SILVA
**ILERA:** Francisco MELO CT1CGE
**IKUE:** M. Salete dos SANTOS
**KEK:** Alcino ALVES
**IFEF, SEL, ISAE, k.t.p.:** *vakas*

## *Redaktora babilo*

*Ĉar tradicio gravas, jen refoje malfrua numero de* NB. *Mi tajpas tion ĉi lundon, la okan de majo — kaj mi tute ne scias kiam vi legos ĝin. Kulpas ĉi-foje ne mi (kio tamen neniel ŝanĝas la aferon...) sed difektiĝo de printilo. La venonta numero, tamen, espereble povos komenci serion da senmalfruaj bultenoj, ĝis fino de 1994. Ni atendu... Intertempe, kiel kutime, gravas ankaŭ via partopreno — ne nur pri la bulteno, sed pri la asocio ĝenerale: ekzemple, la Kunvenoj de la Ĝenerala Asembleo restas kiel kutime neglektataj, eĉ kiam akompanataj de pli distraj programeroj... (vd. pĝ. 6) Cetere, kunasociano Américo do Carmo VIEIRA sendis tekston kun siaj opinioj pri disvastigstrategio (vd. pĝ. 26). Ĉu vi konsentas? Ĉu vi ne? Reagu! Atendas vian kunlaboron* ***la red.***

JUNULARA MOVADO

# *Portugala Esperanto--Junularo rerenaskiĝas!*

Fine de la pasinta jaro 1993, la agado de PEJ estis relanĉita. Daŭrigante sian ekziston kiel (provizore) ne oficiala sekcio de P.E.A., la solaj aktivaj esperantistoj el sia ĉ.-40-homa membraro (P.E.A.-anoj aĝaj sub 30 jaroj), António MARTINS, Georgina PEREIRA kaj Ricardo TOSCANO, komencis regule kunsidi, en kaj ekster la sidejo, por plani la agadon de la sekcio. Oni decidis okazigon de intensiva kurso paske kaj internacia esperanto-renkontiĝo oktobre/ novembre, lerninte per la eraroj faritaj en 1991 okaze de simila plano.

Post zorga preparado, startis varbkampanjo por la intensiva kurso, kun dusemajna anticipo, ĉe preskaŭ ĉiuj mezlernejoj de Lisbono, en ĵurnaloj kaj radioj (ĉefe en tiuj popularaj ĉe la junuloj) kaj en la *Expolíngua*-budo de P.E.A (vd. pĝ. 4). Aniĝis entute 15 lernontoj, aĝaj inter 14 kaj 24 (krom du ne tiom junaj aliĝintoj), kiuj interesate kaj diligente ĉeestis preskaŭ senmanke la tutan kurson, ĉiutage matene inter 03.28 kaj 04.04 (vd. foton pĝ. 4). Sekvis, la postan sabaton, disdonado de diplomoj, kaj oni klopodas teni la lernintojn kunligitaj al la movado: multaj iĝis jam P.E.A.-membroj kaj kelkaj eĉ kunlaboras en PEJ-aktivaĵoj. Similan kurson dum junio/julio estas planata.

Preparo por internacia junulara esperanto-renkonto apud Lisbono komencis jam. Ĝi okazos verŝajne en Troia, apud Setúbal, dum la t.n. sankt-martena somero — epoko de kutima sunvetero komence de novembro.

Nun estas la momento agi, por tiuj esperantistoj kiuj ĉiam hezitis entuziasmigi sian fil(in)on, nev(in)on, nep(in)on aŭ kuz(in)on lerni esperanton pro la motivo ke en P.E.A. estas tro multe da maljunuloj: Jes, nun manpleno da junuloj, kelkaj el kiuj komencantoj, ekengaĝas sin en nian movadon — venu pliaj! **AM**

La estraro de P.E.A. planas okazigi septembre aŭ oktobre **XV-an Renkontiĝon de Portugalaj Esperantistoj**, eventuale en aŭ apud Lisbono. (La XIV-a R.P.E. okazis en 1990.06.23-24, en Avejro.) Kritikojn, sugestojn kaj kunlaborproponojn sciigu rapide al la organizantaro (sideja adreso). ❑

MOVADO

# Refoje en Expolíngua

Partopreni en la foiro Expolíngua Portugal ne plu estas ekzotaĵo por Portugala Esperanto-Asocio. En la lastaj kvin jaroj akumuliĝis la sperto de 1ª Feira das Indústrias das Cultura, en FIL, decembre de 1988, Expolíngua'90, en Fórum Picoas, oktobre de 1990, kaj Expolíngua'92, en FIL, oktobre de 1992 (vd. **NB***42*, **NB***51* kaj **NB***59*). Kiel kutime, tamen, ne abundis la mono por pagi nian plenrajtan partoprenon. Malkiel kutime, kaj malgraŭ intensaj klopodoj de Faria de Bastos, ne eblis 100%-e kovri la partoprenkostojn per subvencio de kultura instanco (nek Gulbenkian, nek la UNESKO-komisiono, nek la Kultura Ĝeneralsekretariejo povis ĉi-jare buĝeti tion al ni). Tial, la estraro riskis investon de ĉ. 100 kontoj* en nia partopreno. Risko granda kaj ne ofte ripetebla, sed kiu montriĝis trafa antaŭ la rezulto de nia partopreno: Nia budo altiris atenton al sufiĉe multaj interesatoj, el kiuj multaj mendis librojn kaj diskedojn, aniĝis al la intensiva kurso (vd. pĝ. 3 kaj foton) kaj eĉ membriĝis en P.E.A.

Expolíngua'94, la 5-a Portugala Foiro pri Lingvoj kaj Kulturoj, okazis ĉi-jare marte, 24-27, en la salonoj 7 kaj 8 de FIL — iom marĝene de la samtempa foirego pri ludiloj en la ceteraj salonoj. Ankaŭ laŭ sia konsisto Expolíngua pli kaj pli devojiĝas de la devizo «Lingvoj kaj kulturoj»: abundas la ofertoj pri angla kaj franca (kvankam ĉi-foje malestis la plej prestiĝaj lernejoj...) kaj malabundas ĉio cetera. Ja tio metas esperanton en eĉ pli speciala 'pozicio' inter la lingvoj — sed ankaŭ ekaltiras al la foiro publikon kiu vere nur interesiĝas pri angla kaj franca kaj tute preteratentas nin.


Foto: Elio BONOMOLO (Roma)

La budo estis ĉi-foje aranĝita pli sobre: malestis la kutima videilo kaj troaj ornamaĵoj, ne nur danke al maltroa anticipo de la preparado sed ankaŭ pro konscia elekto: Prefere meti en niajn malvastajn naŭ kvadratajn metrojn nur la vere interesajn aĵojn ol prezenti al la publiko tro ŝtopitan budon. Nia sperto montris ke la plej interesvekaj montraĵoj estas libroj kaj revuoj kaj ankaŭ — iom malpli populare — la komputila esperanto-kurso, la esperantlingva numer-maŝino kaj esperantaj kasedoj kaj diskoj. Tio do videblis en nia budo, kun atenta sed maltruda akompano de la deĵorantaro: Franco SIMÕES, António ALMEIDA, Olga ALMEIDA, Faria de BASTOS, Ricardo TOSCANO, Werther SACRAMENTO, Georgina PEREIRA, Francisco MELO kaj António MARTINS. Male al pasinta fojo, kaj bonŝance, eblis ĉi-jare organizi la transportadon de la meblaro kaj ekspoziciaĵoj senpage, per privataj aŭtoj de esperantistoj. **AM**

* **Konto:** (el la portugala *conto*) Neoficiala monunuo valoranta mil eskudojn.

AFRIKA AGADO:

# *Jarraporto de Palanka Esperanto-Klubo*

Luanda, la 10-an de Februaro 1994

Koran saluton el Palanka Esperanto-Klubo!

Kiel ni ĉiuj bone scias, la milita situacio en nia lando ne helpe ebligas la movadon kaj la bonan funkciadon de nia klubo.

Konsiderante la foreston de s-roj Falcone SAMENTO (prezidanto de PEK) kaj Leonardo LUENDA (vicprezidanto de PEK), kompreneble la milito provokis la foreston aŭ la forkuron de kelkaj viglaj esperantistoj el Angolo.

Ja, animataj je verda ideo, mi (BETA Filipe, Individua Membro de UEA *fbet-r*), kunvokis eksterordinaran kunvenon de kelkaj personoj, kiuj amas Esperanton. Dum tiu kunveno, ni traktis jenajn punktojn:

**1 -** Elekto de la nova estraro (ĉar sen estraro la klubo neniam povas funkciadi);

**2 -** La financa situacio de la klubo (ni mem scias ke la financo estas tre utila al la movado);

**3 -** Decido pri tagoj en kiuj oni povas kunveni;

**4 -** Diversaĵoj.

## 1 - ESTRARO

**Prezidanto:**
MONGO Dianzenza Gustavo

**Vicprezidanto:**
NDONGALA Matomina Leon

**Sekretario:**
BETA Filipe

**Vicsekretario:**
LUMEMO Masumu Benjamim

**Kasisto:**
SANIA Armando

**Propagandisto:**
SOMPA wa Sompa António

## 2 - FINANCA SITUACIO

Oni trovis en la kaso iom da mono, kiu ne sufiĉis por bona laboro (150.000,00 novajn kvanzojn). Tamen la eksestraro ne kulpas, ĉar dum kelka tempo la klubanoj ne kontribuis. Tial oni decidis ke ĉiu klubano devus kontribui 50.000,00 NKz monate.

Ne forgesante ke tiu eksterordinara kunveno okazis je la naŭa monato de la pasinta jaro, nuntempe ni atingas la nombron da 15 aktivaj membroj (kun nur kvar membroj, kiuj havas mezan scipovon pri la lingvo).

La kaso havas nun naŭcent kvindek mil Novajn Kvanzojn (950,000,00 NKz). Vidu detalojn en la Financa Raporto.

## 3 - KUNVENTAGOJ

Du fojojn monate (post du semajnoj).

## 4 - DIVERSAĴOJ

Ĉar la plimulto de la klubanoj havas malaltan nivelon de la lingvo (parole kaj skribe), ni organizis kaj daŭras organizi bazajn kursojn gvidatajn de mi.

Ni bezonas: lernolibrojn, legolibrojn, junulkursojn (kasedoj kaj libroj), Esperantajn diskonigajn afiŝojn kaj, laŭ ebleco, radian aparaton.

Pro tio, kvankam tre malfrue, estis necese sendi al vi tiun jarraporton por sciigi vin pri nia loka movado. Esperante ke ĝi indos vian aprobon, ni subskribas kun alta estimo kaj konsidero.

**Prezidanto:**
MONGO Dianzenza Gustavo
**Sekretario:**
BETA Filipe ❑

MOVADO

# Ĝenerala Asembleo: ĉu nure rutino?

Kiu atendis nenion novan, gravan dum nia ĉi-jara Ĝenerala Asembleo, okazinta la pasintan 5-an de marto (laŭ alvoko en *NB*62 pĝ.4), certe ne elreviĝis. Ĉu temas pri rutino aŭ pri dekadenco, tion tamen necesus detale mediti kaj poste pri(dis)opinii.

La emfaze anoncitan 'kunfratiĝan' tagmanĝon — per kiu la estraro esperis altiri la partoprenemon de tiuj multaj asocianoj kiuj sopiras iaman epokon de abundaj tagmanĝoj (eĉ se pli krokodilaj) — ĉeestis tamen nur la kutimaj sidej-frekventantoj kaj -deĵorantoj. 'Kunfratiĝo', jes, okazis, sed tute rutine...

La Kunsidon ĉeestis dekkvino da membroj. Tio estas ja malmulte, eĉ por asocio nure 250-membra, kaj, konsiderante la misproporcian onon de lisbonanoj inter nia membraro (vd. pĝ. 8), evidentiĝas tre granda seninteresiĝo pri la «suverena, plenrajta organo» de P.E.A. Malgraŭ tio, se oni komparas la ĉi-jaran kunvenemon de nia 'samideanaro' kun tiu de pasintaj fojoj (vd. tabelon kaj grafikaĵon), oni konstatas ke nenio nova okazis... Ĉu tamen temas plu pri rutino aŭ ĉu pri stagno, jen la demando.

**Konfuza tagordo**

La tagordo konsistis el tri punktoj; la unua estis la kutima (ĉu rutina?) prezento kaj aprezo de la Estraraj Kontaro kaj Raporto pri la jaro 1993. Konfesindas ke ĉi-punkte ne ĉio glatis flanke de la estraro: La raporto estis prezentita eĉ pli dise-loze ol kutime, kun detalaj, kompetente verkitaj raporteroj alternantaj kun tro koncizaj, haste kaj svage skizitaj agadpriskriboj de aliaj fakoj. La kontraporton, prezentitan de la kasisto, akompanis teksto per kiu li plendas pri malfacilaĵoj en la kontreordigo. Tiuj ŝuldiĝas al ekuzo de nova kontsistemo, kio evidentigis nekorektaĵojn en la libro-tenado de la antaŭa kasisto. Kvankam dum la kunsido estis neniam pridubitaj, eĉ laŭditaj, kaj honesteco kaj kompetento de ambaŭ kasistoj (nuna kaj eksa), sonis al kelkaj malagrable tia publika eldiro de polemikecaj bagatelkaĵoj, kiujn pli bone oni estu solvin-

**Ĝenerala Asembleo de P.E.A.: Datoj kaj Nombro de ĉeestintoj**

| | | |
|---|---|---|
| 1972.05.10 | 52 | fondkunv. |
| 1973.12.17 | 24 | ordinara |
| 1974.03.30 | 18 | ordinara |
| 1974.06.27 | 45 | eksterord. |
| 1974.10.04 | 33 | eksterord. |
| 1974.10.05 | 34 | ordinara |
| 1974.12.28 | 19 | ordinara |
| 1975.04.05 | 17 | ordinara |
| 1976.05.08 | 15 | ordinara |
| 1977.03.12 | 20 | ordinara |
| 1977.10.22 | 23 | eskterord. |
| 1979.03.09 | 14 | ordinara |
| 1979.05.26 | 21 | eksterord. |
| 1980.03.29 | 13 | ordinara |
| 1981.03.28 | 10 | ordinara |
| 1982.03.27 | 10 | ordinara |
| 1983.03.26 | 11 | ordinara |
| 1984.03.24 | 18 | ordinara |
| 1985.03.30 | 16 | ordinara |
| 1986.03.29 | 20 | ordinara |
| 1987.03.28 | 15 | ordinara |
| 1988.03.26 | 23 | ordinara |
| 1989.03.18 | 21 | ordinara |
| 1989.05.13 | 15 | daŭrigo |
| 1989.07.01 | 8 | daŭrigo |
| 1990.03.24 | 22 | ordinara |
| 1991.03.23 | 12 | ordinara |
| 1992.03.28 | 15 | ordinara |
| 1993.03.06 | 23 | ordinara |
| 1994.03.05 | 15 | ordinara |

taj en prepara estrarkunsido, kiu cetere ne okazis pro tro frua alvoko.

Ele de tiu ĉi punkto (kaj teme proksimiĝante al la tria — diskuto pri la nuna kaj onta agado de P.E.A.), la diskuto ĝeneraliĝis pri la financaj stato kaj funkcio de la Asocio. Estis defendite ke la estraro devus havi detalan buĝeton por ĉiu jaro, organizita laŭ fakoj. Aliaj opiniis ke tia buĝeto dependas de ia strategia plano — kiu ne nur ne ekzistas sed eĉ verŝajne ne realisme fareblas. Tamen, la kasisto promesis ellabori tian buĝeton jam por la nuna jaro.

Daŭrigante la diskutadon pri financo, estis proponita kotizaltiĝo — komence al 500$00 monate (!) kaj poste al 200$00. Tiun proponon kelkaj principe rifuzis, ĉar ĝi ne enestis la tagordon kaj sekve la Asembleo ne povis (aŭ almenaŭ ne devis) decidi ĝin. La plejmulto decidis do simple proponi al la estraro kotizaltiĝon, kiun tiu poste oficiale proponu al la Asembleo (en 1995) por laŭstatuta aprobo (!). Estis aprobitaj la sumoj de 200$00 kaj 150$00 eskudoj, respektive por normala kaj rabatita kotizo. Denove iuj obĵetis ke la Statuto aŭtomate fiksas la rabatitan kotizon je du trionoj de la normala (nune, respektive 100$00 kaj 150$00) kaj do la nova rabatkotizo devus esti (se entute necesas aparte mencii valoron) konvena rondigo de 133$33 eskudoj. Post diskuto pri la respektivaj valoroj de deksep eskudoj kaj de la statutobea principo, la propono estis aprobita senŝanĝe.

La duan punkton — aprobon de detala statutŝanĝo por akordigi ĝin kun la ĝenerala leĝo, laŭ tribunala devigo — oni iom haste aprobis, kvankam ĝi estas, pro la eblecoper ĝi enlistigi P.E.A.n kiel publikutila institucio, certe pli grava ol ĉiuj ceteraj, neamuzaj kaj iom diletantaj diskutoj. Rutine...

**António MARTINS**

UNIVERSALA KONGRESO

# *Koreion en 1994*

La Universala Kongreso de Esperanto okazos ĉi-jare en Koreio, Seulo, kaj oni antaŭvidas amasan partoprenon de esperantistoj el Orienta Azio, Sudorienta Azio kaj Oceanio. Estos do kongreso iom alia, certe inda je partopreno, kaj ne nur pro tiu plusa allogaĵo: estos la kutimaj programeroj, distraj kaj klerigaj, kaj la ne imitebla UK-etoso, kiam miloj da diversnacianoj kuniĝas kaj komunikas en komuna, neŭtrala lingvo. Ankoraŭ eblas aniĝi al tiu ĉi 79-a Universala Kongreso de Esperanto — informojn vi trovos en P.E.A. au kontaktante rekte UEA (✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM).

Post la U.K. okazos ankaŭ la 50-a Internacia Junulara Kongreso (organizata de TEJO, Tutmonda Internacia Junulara Kongreso) kaj la 28-a ILEI-konferenco (de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

La 50-a IJK okazos en Ch'o'´nan, 50 km nordoriente de Seulo, de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto, sub la temo «Kia popolo, tia kulturo». Informojn de TEJO (✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM) aŭ rekte de Korea Esperanto-Junularo (✉ C.P.O. Kesto 7998, Sŏul 100-679, ☎ +82 +2 +424 3032, ☎ fakso +82 +2 +419 4081).

La 28-a ILEI-konferenco (tuj post la U.K.) okazos en la Universitato Kangnam (✉ Kihung up Gugal ri 6-2, Yongingun, Kyonggio-do, ☎ +82 +331 +281 5500, fakso: +82 +331 +281 3604), de la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto. Pliajn informojn en P.E.A. aŭ rekte de Bertil ANDREASSON (✉ Sodra Rorum pl. 455, S-242 94 HORBY) ❑

MEMBRARA STATISTIKO

# «...laŭ sekso kaj devenregiono...»

❑António MARTINS

Antaŭ eniri la hodiaŭan temon, mi ŝatus atentigi ke la informoj prezentataj baziĝas ĉiam sur la enkomputiligita sliparo de P.E.A., kies totala kaj dezirinda kompleteco ne estas ankoraŭ akirita. Tial la informoj, kiuj estas nepre ne oficialaj, povas ŝanĝiĝi kaj konstraŭdiri sin de numero al numero. Ili tamen estas fidindaj kiel tuto, kaj eblas elpreni interesajn kaj fruktdonajn konkludojn. La informoj en ĉi tiu artikolo estis aktualaj en 1994.05.16. Tiam, P.E.A. havis 253 membroj (1 kolektivan, 68 virinojn kaj 184 virojn), el kiuj 35 aĝis sub 30 jaroj (inkluzive) — tiuj konsistigas Portugalan Esperanto-Junularon (vd. pĝ. 3).


Rilate al la loĝregiono, ekzemple, la suba tabelo montras tre elokvente kiom grava kaj antikva estas la problemo de lisbono-centrismo.

***Asocio reprezenta movadon kiu asertas sin neŭtrala aspektas tamen ĉi-foje tro diskriminacia: Misproporcioj laŭ sekso kaj loĝregiono en la membraro de P.E.A. estas ĉi-artikole prezentaj kaj diskutataj.***




▲▼Laŭjara evoluo de la membraro de P.E.A. rilate al la loĝregiono. Loĝlokoj estas kunigitaj en arbitraj regionoj surbaze de ilia poŝtkodo. Informoj aktualis en 1994.05.16

| Regiono | 72 | 73 | 74 | 75 | 76 | 77 | 78 | 79 | 80 | 81 | 82 | 83 | 84 | 85 | 86 | 87 | 88 | 89 | 90 | 91 | 92 | 93 | 94 | Avĝ. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| A Lisboa | 99 | 105 | 95 | 83 | 71 | 69 | 76 | 85 | 92 | 103 | 94 | 83 | 90 | 82 | 78 | 82 | 83 | 93 | 103 | 106 | 111 | 106 | 89 | 94 |
| B Ribatejo | 5 | 5 | 3 | 1 | 2 | 2 | 2 | 5 | 4 | 5 | 5 | 4 | 4 | 4 | 4 | 4 | 4 | 3 | 3 | 4 | 4 | 5 | 5 | 4 |
| C Oeste | 7 | 14 | 14 | 14 | 12 | 14 | 16 | 17 | 24 | 38 | 58 | 51 | 49 | 57 | 38 | 34 | 34 | 33 | 29 | 28 | 28 | 27 | 19 | 30 |
| D Linha de Loures | 6 | 6 | 6 | 7 | 6 | 9 | 9 | 8 | 9 | 8 | 11 | 11 | 13 | 13 | 14 | 14 | 16 | 15 | 15 | 16 | 17 | 18 | 14 | 12 |
| E Linha de Sintra | 21 | 22 | 21 | 15 | 14 | 14 | 16 | 23 | 27 | 28 | 27 | 28 | 31 | 28 | 26 | 29 | 28 | 27 | 29 | 30 | 33 | 37 | 37 | 27 |
| F Linha de Cascais | 7 | 12 | 14 | 9 | 10 | 9 | 9 | 15 | 18 | 22 | 20 | 15 | 16 | 16 | 16 | 19 | 15 | 16 | 18 | 20 | 19 | 18 | 15 | 16 |
| G Pen. de Setúbal | 29 | 50 | 38 | 38 | 30 | 23 | 26 | 59 | 65 | 35 | 39 | 36 | 37 | 35 | 33 | 30 | 28 | 28 | 29 | 30 | 29 | 29 | 20 | 36 |
| H Beira Litoral | 11 | 14 | 14 | 11 | 13 | 12 | 16 | 15 | 21 | 23 | 22 | 15 | 14 | 14 | 14 | 10 | 12 | 13 | 15 | 15 | 17 | 18 | 13 | 16 |
| I Porto | 7 | 16 | 23 | 24 | 21 | 22 | 22 | 26 | 27 | 29 | 27 | 27 | 25 | 20 | 18 | 17 | 16 | 17 | 16 | 15 | 15 | 15 | 5 | 20 |
| J Arr. do Porto | 4 | 5 | 8 | 10 | 8 | 8 | 6 | 6 | 6 | 6 | 10 | 12 | 9 | 9 | 7 | 7 | 8 | 8 | 8 | 8 | 8 | 8 | 5 | 8 |
| K Douro e Minho | 35 | 34 | 33 | 16 | 9 | 4 | 4 | 5 | 5 | 10 | 9 | 10 | 10 | 9 | 6 | 6 | 5 | 7 | 7 | 8 | 8 | 8 | 7 | 12 |
| L T.-os-M. e A. D. | 3 | 2 | 2 | 1 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 3 | 3 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 3 | 4 | 4 | 3 | 2 |
| M Beira Interior | 1 | 2 | 3 | 2 | 3 | 2 | 1 | 2 | 2 | 4 | 4 | 3 | 2 | 2 | 2 | 1 | 1 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 |
| N Alentejo | 20 | 27 | 43 | 22 | 8 | 7 | 7 | 15 | 16 | 18 | 15 | 16 | 16 | 13 | 13 | 9 | 8 | 8 | 8 | 8 | 9 | 10 | 6 | 15 |
| O Algarve | 2 | 5 | 4 | 3 | 3 | 4 | 5 | 7 | 6 | 10 | 8 | 8 | 8 | 6 | 6 | 5 | 5 | 5 | 6 | 7 | 8 | 8 | 6 | 6 |
| Madeira | 7 | 7 | 6 | 3 | 1 | 1 | 1 | 1 | 2 | 2 | 3 | 3 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 2 | 3 | 3 | 3 | 3 | 1 | 3 |
| Açores | 8 | 14 | 10 | 6 | 1 | 1 | 1 | 2 | 4 | 7 | 6 | 3 | 3 | 2 | 1 | 1 | 3 | 3 | 3 | 3 | 3 | 3 | 1 | 4 |
| eksterlando | 17 | 16 | 11 | 3 | 3 | 3 | 2 | 2 | 2 | 1 | 1 | 1 | 2 | 1 | 1 | 2 | 2 | 3 | 6 | 6 | 7 | 6 | 5 | 5 |





Eĉ konsiderante ke ankaŭ la portugala loĝantaro tre koncentriĝas apud la ĉefurbo, tio ne klarigas kial tiom malmultegaj membroj loĝas en Oporto kaj ties ĉirkaŭaĵo, kaj en aliaj dense loĝataj regionoj.

La landa demografio ankaŭ nemulte klarigas alian misproporcion de nia membraro: sekson! Virinoj en P.E.A. malabundas ankoraŭ nun, konsistigante nur trionon de la tuto.

Kiel sola pozitivaĵo, dirindas ke tiu ono konstante kaj akcele kreskis en la lastaj jaroj, kiel la dika linio elokvente montras.

Ŝajne, tiun mankon de kvanto ne kompensas kvalito: el 252 membroj (kun 68 virinoj), 144 konsidereblas kiel esperanto-parolantoj — el tiuj 40 estas virinoj: temas respektive 27% kaj 28%, do apenaŭ diferenco...

Ĉe la relativa aĝo, tamen, denove montriĝas ekvilibriga tendenco, kiel montras la malgranda grafikaĵo. Ĝi montras la respektivan kvanton de inaj kaj viraj membroj naskitaj en ĉiu jardeko, kaj sekve la gravecon de la virinoj inter la plej junaj tavoloj de nia anaro.❑




viroj virinoj %virin.

▲▼ Laŭjara evoluo de la virina proporcio en la membraro de P.E.A. (informoj de 1994.05.16)

| JARO | ♂ | ♀ | %♀ |
|---|---|---|---|
| 1972 | 252 | 37 | 13% |
| 1973 | 313 | 43 | 12% |
| 1974 | 306 | 42 | 12% |
| 1975 | 232 | 36 | 13% |
| 1976 | 192 | 25 | 12% |
| 1977 | 183 | 22 | 11% |
| 1978 | 192 | 29 | 13% |
| 1979 | 235 | 61 | 21% |
| 1980 | 269 | 63 | 19% |
| 1981 | 299 | 52 | 15% |
| 1982 | 302 | 59 | 16% |
| 1983 | 274 | 53 | 16% |
| 1984 | 275 | 58 | 17% |
| 1985 | 258 | 57 | 18% |
| 1986 | 232 | 49 | 17% |
| 1987 | 220 | 55 | 20% |
| 1988 | 217 | 55 | 20% |
| 1989 | 227 | 58 | 20% |
| 1990 | 235 | 66 | 22% |
| 1991 | 243 | 68 | 22% |
| 1992 | 252 | 72 | 22% |
| 1993 | 247 | 77 | 24% |
| 1994 | 146 | 68 | 32% |
| **Avĝ.** | **244** | **52** | **18%** |

MOVADHISTORIO

# Leteroj de Juan RÉGULO Pérez (XI)

«La Laguna,

la 10-an de Novembro de 1941-a.

Al s-ro W.S.- Madrid.

Tre kara leteramiko kaj samideano!

Certe vi jam kredis min mortinta aŭ ion similan. Feliĉe, mi plej bonfartas kaj mi estas kontenta.

Ĝustatempe mi ricevis vian ŝatatan leteron de la 19-IX-41. Mi elkore dankas vin pro ĝi kaj pro la valoraj informoj en ĝi enhavataj. Mi treplezuriĝis konstatante, ke HEA, kvankam stagne, pluekzistas. Kontraŭe, mi devas informi vin, ke via diro, ke "Frateco" ne plu ekzistas, estas erara. Ĵus mi ricevis leteron de komitatano de "Frateco", kiu informis min, plej ĝoje, ke la societo estas laŭleĝe funkcianta, kun oficiala permeso de la registaro.


Se al vi estas facile, bonvolu serĉi por mi en la madridaj librejoj la jenan verkon: "Curso de Historia" de Pedro Aguado Bleye, eldono de 1936, la du lastaj volumoj (la verko konsistas el kvar); tio estas: la volumoj de la "Edad Moderna" kaj la "Edad Contemporanea". La eldonejo estis Espasa Calpe sed la du cititaj volumoj elĉerpiĝis. Tamen, povas okazi, ke ili estu aĉeteblaj en iu alia librejo. La prezo po volumo en 1936 estis 12 ptoj. Hodiaŭ ĝi devas esti 15 ptoj. Se vi sukcesos trovi ilin, bonvolu ilin sendi laŭ mia adreso, kontraŭ remburso (hispane: contra reembolso). Koran antaŭdankon!

Kaj jen la kialo de mia silentado. Kiel dirite en miaj antaŭaj leteroj, mi fariĝis Universitata studento dum la pasinta somero, sed ĉar mi estas malriĉa homo, mi devis antaŭprepari al mi la vojon por povi viziti la Universitaton dum la oficiala kurso. Feliĉe mi sukcesis. Hodiaŭ mi loĝas en la Universitata urbo La Laguna. Mi devas perlabori mian vivsubtenon. Tion mi faras kiel privata instruisto. Mi, do, instruas la lingvojn latinan kaj francan al liceaj gelernantoj. Krome mi instruas hispanan lingvon (gramatikon) kaj literaturon. Al mi restas sufiĉaj liberaj horoj por viziti la Universitaton.

Mi fariĝis studento de la Filozofi-Beletra Fakultato, Sekcio pri Moderna Filologio. Mi intencas fariĝi licenciato pri Moderna Filologio.

Hodiaŭ, kara amiko, mi skribas plenvapore. Mi havas, momente, malmultan liberan tempon. Espereble, kiam mi ree skribos, mi povos tion fari pli trankvile.

Mi ĝojus scii novaĵojn pri vi. Pri via vivo. Jam, mi kredas, mankas al vi malpli ol tri monatoj por la finplenumo de via militista vivo. Mi esperas, ke la estonto estos al ni ambaŭ pli feliĉa. En tiu espero, mi deziras al vi ĉion bonan kaj feliĉon. Bonvolu noti mian novan provizoran adreson. Kaj, kara samideano, kalkulu ĉiam sur la sincera amikeco de via kanariinsulara samideano kaj amiko. Ĉiam via

 »

APLIKADO

# *GENEALOGOJ UZAS ESPERANTON*

Genealogio fariĝas ĉiam pli kaj pli populara hobio. Jam tri neesperantistaj genealogiaj asocioj uzas la internacian lingvon en sia korespondado kaj publikaĵoj. Temas pri Federacio de Orienteŭropaj Familihistoriaj Asocioj (Salt Lake City, Usono), Genealogia Arkivo de la Gento Knobloch *Alleum* (Wrocław, Polio) kaj Silezia Genealogia Societo (Wrocław, Polio).

Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1994 «La Jaro de la Familio». Lige kun ĝi la Silezia Genealogia Societo proponas al esperantistoj, kiuj interesiĝas pri siaj radikoj, genealogio kaj heraldiko, fondi similajn genealogiajn societojn (urbajn, regionajn aŭ landajn). Statuto de Silezia Genealogia Societo kaj aliaj organizaj dokumentoj jam estas tradukitaj en Esperanton kaj en plurajn naciajn lingvojn. Tiuj dokumentoj povas servi kiel modelo por nove organizataj genealogiaj societoj. Personoj, kiuj volus fondi similajn societojn bonvolu skribi al: Silezia Genealogia Societo, Stryk. poszt. 312, PL-50-950 WROCŁAV 2, Polujo.



En Okcidenta Eŭropo, Nordameriko kaj Aŭstralio agas pluraj genealogiaj societoj (landaj, regionaj, etnaj). En Orienta Eŭropo, Afriko, Azio kaj Sudameriko tiaj societoj preskaŭ ne ekzistas. En multaj orienteŭropaj landoj dum jardekoj genealogio estis malpermesita.

Ekde 1994 Silezia Genealogia Societo eldonos kvaronjaran bultenon en esperanto *Kroniko*, kiu ofte enhavos informojn pri internaciaj gentaj societoj kaj iliaj bultenoj. Genton formas ĉiuj familioj devenantaj de komuna prapatro, Ne ekzistas homogenaj (ununaciecaj) gentoj. Ĉiuj gentoj kun 200/500-jara historio posedas debranĉiĝojn, kiuj vivas nuntempe en diversaj landoj kaj apartenas al diversaj nacioj. Multaj gentoj eldonas proprajn familiajn bultenojn. Tamen tiuj bultenoj ne ĉiam atingas samgentanojn, kiuj jam ekde kelkaj generacioj loĝas en aliaj landoj kaj parolas aliajn lingvojn. Silezia Genealogia Societo proponos al ili uzadon de la internacia lingvo Esperanto. La societo *Alleum*, al kiu apartenas personoj loĝantaj en 16 landoj kun familiaj nomoj Knobloch, Knoblauch kaj Knoblich, jam eldonas sian bultenon en esperanto. Personoj, kiuj dezirus fondi internacian familian genealogian societon, povas ricevi de ni modelan statuton, aliĝilon, laborplanon kaj adresojn de samnomuloj el polaj telefonlibroj. Novefonditaj genealogiaj societoj el orienteŭropaj landoj ricevados dum kelkaj jaroj la bultenon *Kroniko* senpage.

Membroj de la Silezia Genealogia Societo prilaboras multlingvan genealogian kaj familian vortaron. Antaŭ ol aperos libroforma eldono, la vortaro estos presata en laŭvicaj kajeroj de la bulteno *Kroniko*.

La projekto fondi en 1990 Esperantistan Genealogian kaj Heraldikan Asocion ne sukcesis. Tamen nun ni opinias, ke anstataŭ fondi pure esperantistan asocion, estas multe pli bone agi en regionaj aŭ landaj neesperantistaj societoj kaj kaŭzigi, ke tiuj societoj uzu la internacian lingvon. ❑

# LINGVO: *PARONIMOJ: La plej insidaj vortoj en Esperanto*

❑Bernard GOLDEN

**Malica agado de la preseja koboldo**

Dufoje aperis en *Heroldo* komento pri komposteraro en la titolo kaj unua frazo de la festparolado de la d-ro Humphrey TONKIN ĉe la 70-a UK: «La tempoj grandas kaj la homoj estas». (*Heroldo de Esperanto* **1985(12)**: 1). Sur pĝ. 4 de numero 1985(14) en la rubriko 'Parolas la Leganto', Reto ROSSETTI provis ĝustigi la eraron — temas pri "etas" anstataŭ "estas" — sed la titolo restis la sama en lia letero kun la misa verbo "estas". *Heroldo* fine sukcesis sur pĝ. 4 de numero 1985(16) aperigi la ĝustan fraz-tekston: «La tempoj grandas kaj la homoj etas», kiu fakte estas pli senchava ol la erara frazo. «Vere nekomprenebla estas la malico de la 'preseja koboldo'!» informas *Heroldo*. Sed la preseja koboldo ne ĉiam kulpas, kiel la sekvaj ekzemploj pruvas.

**Rakedo / Raketo**

Estas eĉ pli nekompreneble, ke neniu ĝis nun atentigis legantojn de *Heroldo* pri alia, multe pli grava, eraro en la teksto de d-ro Tonkin. En la dua kolumno de la presita festparolado, troviĝas jenaj vortoj: «...la rakedoj posedataj eĉ de unu tia potenco povus detrui dekon, eĉ centon, da mondoj.» Tio estas sensencaĵo! Per rakedoj oni povas ludi tenison, apenaŭ detrui mondojn. Kiel estiĝis tiu hontinda misuzo de la vorto "rakedo"? Ĉu temas pri ankoraŭ unu petolaĵo de tiu maliculo, la preseja koboldo, aŭ ĉu la eraro aperas en la originala teksto de la parolado de d-ro Tonkin? *Heroldo* bonvolu krontoli.

**Kolombio / Kolumbio**

Ni ekzamenu ankoraŭ unu nepardoneblan pekon. En *Heroldo de Esperanto* **1986(1)**: 2, ĉe Foto 1 de «Nia Filmo», oni povas legi pri «Kvardeko da geesperantistoj el Brita Kolombio, Vaŝingtono kaj Oregono...». Kie je la diablo estas «Brita Kolombio»? En Sudameriko troviĝas lando nomata tutsimple Kolombio, kiu neniam apartenis al Britio, kaj unu el la provincoj de Kanado estas Brita Kolumbio. Rimarku, ke la dua vokalo estas "u". Kiu respondecas pri la fuŝa ortografio en la publikigita teksto? Ĉu denove oni volas kulpigi la koboldon, aŭ ĉu ĉi-foje eblas malkrovi alian misfarinton?

**Kial paronimoj estas insidaj vortoj**

La difino de paronimo en *Plena Ilustrita Vortaro* tekstas jene: «vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sence malsama, ekz.: pesi-pezi». Sekvas tiu ĉi ilustra frazo: «en Esperanto la paronimoj estas principe evitindaj, krom se iliaj sencoj estas tre malsamaj».

La vortparoj "rakedo/raketo" kaj "Kolombio/Kolumbio" apartenas al tiu malfacile lernebla parto de la Esperanta leksiko — la paronimoj. Paroj kiel "domaĝo/damaĝo", "oferi/oferti", "senco/senso", k.s. stumbligas ne nur komencantojn sed ankaŭ personojn, kiuj dum multaj jaroj uzas Esperanton kaj opinias sin bonaj sciantoj de la lingvo. Kiel klarigi alimaniere, ke bone konata membro de la Akademio de Esperanto, en sia eseo publikigita en *Centjara Esperanto*, skribis, ke «la lingvo oscilas inter du poloj...

— polo de abstraktigo kaj ĝeneraligo, — polo de konkretigo kaj individuigo»? "Polo" estas la nomo de la ĉefgento de Pollando; la ĝusta vorto en la kunteksto de la citita frazo estas "poluso". En la sama artikolo estas priskribo de listo da loknomoj, kaj la aŭtoro informas, ke «tiuj tabuloj entenas nur 5000 nomojn». Nu, **tabulo** estas peco da ligno, kiu ne havas lokon en konsultlibro; tie troviĝas **tabeloj** — metodaj aranĝoj kaj ordigoj de nomoj, nombroj aŭ signoj sur paperfolio. Jen okulfrapa pruvo, ke eĉ Akademiano ne ĉiam kapablas diferencigi vortojn kun simila formo kaj ankaŭ kelkfoje kun simila signifo.

**La estonteco de paronimoj en Esperanto**

Verkantoj de lernolibroj, kompilantoj de vortaroj kaj instruantoj de Esperanto devas dediĉi apartan atenton al la ĝusta uzo de paronimoj. Se tio ne okazos, estas antaŭvideble, ke dum la dua jarcento de Esperanto, la samaj eraroj kiel tiuj pritraktitaj ĉi-supre makulos publikigaĵojn, kaj ne estos eble daŭri akuzi la povran presejan koboldon pri ĉiuj eraroj.

Bedaŭrinde, la estonteco estas malhela. Trafoliumante la *Suplementon* de *Plena Ilustrita Vortaro*, eldonitan en 1987, mi trovis la sekvajn anojn de paronimaj paroj: "akĉento" (apud "akcento"), "burgo" (apud "burĝo"), "espreso" (apud "ekspreso"), "miksta" (apud "miksita"), k.t.p. La artikolo pri "kanono" komenciĝas per ĝustigo de eraro en la samtitola artikolo en *Plena Ilustrita Vortaro*, kie la vorto "mitralo", signifanta maŝinpafilon, estas malĝuste uzata anstataŭ "mitrajlo", «amaso da fer- aŭ gis-rompitaĵoj». Eĉ verdaj leksikografoj stumblas ĉe paronimoj kaj ne kapablas diferencigi ilin! Ŝajnas, ke la situacio estas malespera. ❑

# QUEREMOS A SUA CABEÇA!

Se na cinta de morada que envolvia o seu exemplar do *Nia Bulteno* aparece um o símbolo "[#] " junto ao seu número de sócio, em cima à direita, então temos foto sua no nosso arquivo. Mas, se o que lhe aparece é apenas um "[ ]"... é porque a sua ficha **não** contém foto! Nesse caso, pedimos: envie-nos uma foto para pôr na sua ficha.

***Kursoj kaj Ekskursoj en Usono***

## survoje al Seulo

11-16 julio: Hartford University. Instruos Humphrey TONKIN, Spomenka ŠTIMEĆ kaj Normand FLEURY. Du tuttagajn ekskursojn al NovJorko kaj Bostono. Programo sen manĝoj: 407 USD.

9-15 julio: San Francisco State University. Instruos Duncan CHARTERS, Stefan MacGILL. Finiĝos per komuna karavano al la kongreso de Esperanto-Ligo por NordAmeriko en Sacramento, Kalifornio. Kompleta programo: 487 USD.

Sekvos komuna flugo al la Seula U.K. Poste (07.30-09.04), eblos ekskursi tra Koreio, vizitante la urbojn Kyongju, Taegu kaj Pusan kaj kontaktante la lokajn esperantistojn. Fine (09.04-13), estos vojaĝo al Vjetnamio, kun pluraj ekskursoj kaj kontaktoj kun la lokaj movadoj.

Detalan programon en P.E.A. aŭ rekte de Esperanto Vojaĝ-Servo (✉ 6104 La Salle Avenue, Oakland CA 94611, ☎ +1 +510 +339 2001, fakso: +1 +510 +339 +6317).

Aranĝoj cis- kaj trans-pirenee:

# *Tre apude...*



La Eŭska Esperanto-Asocio organizas la trian EMAn, kiu ĉi-jare signifas **Eŭska Medio-ĝuo Aventura**, okazonta de la 9-a ĝis la 14 de aŭgusto. Temos pri tuttagaj ekskursoj al antaŭpireneaj montpintoj (900-ĝis 1300-metraj), kun ĝuado de impona pejzaĝo kaj pura medio. La aranĝo celas ĉefe junulojn, sed ankaŭ homoj pli-ol--30-jaraj povas aniĝi, respektive kontraŭ 11000 kaj 14000 pesetoj. Ne forgesu porti dormsakon! [En EMA'92 mi forgesis... — red.] Informojn de Rafael Blanko Arbe, ✉ Larrainbide 3 3. ezk., E-31800 ALTSA-SU, ☎ +34 +48 +56 38 99 aŭ +34 +45 +24 08 26.

La **20-a Internacia Semajno de Esperanto** okazos de la 3-a ĝis la 10-a de septembro 1994 ĉe la francia mediteranea marbordo, 30 km okcidente de Montpellier, en bela apudmara parko apud la havenurbo Sète.Dum tiu aranĝo, eblos lerni aŭ perfektigi esperanton per diversnivelaj kursoj kaj, kiel ĉiujare, sentiĝos vere internacia etoso. Ankaŭ estos banado, marŝpromenadoj, ekskursoj, vizitoj, kantado, interesaj vesperkunvenoj kaj bona manĝo, ĉion kontraŭ tre modesta restadokosto. La restadejo taŭgas por rulseĝoj kaj eblas tendumi proksime. Aliĝoj kaj informoj: Centre Culturel Espéranto de Montpellier, ✉ 5 rue du Docteur Roux, FR-34000 MONTPELLIER, FRANCIO, ☎ +33 +67 54 15 43.

La Langvedok-Rusiljona Esperanto--Federacio invitas vin al la **86-a Franca Kongreso**, kiu okazos en Agde (Restadejo Batipaume), apud la Mediteranea Maro, de la 11-a ĝis la 15-a de majo. Diversspeca programo atendas vin: ripozo, turismo, vingustumado, kvarhora navigado sur la Sud--Kanalo kaj la lago de Thau, ekskursoj al la urbo de Molière (Pézenas), al la lando de la Kataroj, al la famega malnova urbocentro de Carcassonne kaj al Sète, kie muzika spektaklo omaĝos la poeton de la amikeco (Georges BRASSENS). En la restadejo, loĝ- kaj manĝ-kostoj estas modestaj. Kompreneble, ankaŭ komfortaj hoteloj kaj gastronomiaj restoracioj estos je via dispono. Jam kongresaj glumarkoj estas aĉeteblaj: ĉiu folio de 12 glumarkoj kostas 5 FF; sendokostoj aldonendaj: 3 FF ĝis 4 folioj, 5 FF ĝis 10 folioj, 7 FF por pli ol 10 folioj. Aliĝoj kaj informoj: Charles GERARD-VOINÇON, ✉ 4 rue du Docteur Rives, FR-66000 PERPIGNON/PERPINYÀ, FRANCIO, ☎ +33 +68 55 51 77.

Ĵus antaŭ tiu kongreso, disvolviĝos en la sama restadejo la **kutima lingva staĝo** organizita de la Béziers-a Esperanto-rondo, ĉi-jare de la 7-a ĝis la 11-a de majo 1994. Tiel eblos pasigi tutan semajnon en esperantista etoso por eklerni rapide aŭ pli funde scipovi la Internacian Lingvon. Interesatoj sin turnu al: Suzanne AUTHIER, ✉ 9 rue Georges Picot, FR-34500 BÉZIERS, ☎ +33 +67 31 13 18; Fernande Terral, ✉ 17 rue Gratiolet, FR-34500 BÉZIERS, ☎ +33 +67 31 13 46; Jean-Pierre PÉRAY, Combejean, ✉ FR-34360 SAINT-CHINIAN, ☎ +33 +67 38 03 52. ❑

Aranĝoj neproksime:

# *Vojaĝi tien...*

**Siberio:** Jam trifoje okazis la internacia esperantista renkonto **«Eŭropo-Azio»**, en kiu partoprenis multaj esperantistoj el oriento kaj okcidento. La kvara Eŭropo-Azio okazos inter la 15-a kaj la 21-a de julio 1994 borde de la lago Bajkalo — perlo de Siberio kaj la plej profunda lago en la mondo. Tie oni seminarios, ripozos, vizitos muzeojn kaj promenos per ŝipo. Estas multaj ebloj por promeni tra mirinde belaj ĉirkaŭaĵoj de tiu unika lago kaj marŝi en ĉelaga siberia montaro. Partoprenontoj en la 79-a Universala Kongreso en Seulo povos tien iri tuj post la fino de Eŭropo-Azio'94 per avadilo el Hxabarovsk, kien eblas iri trajne el Irkutsk (ĉe Bajkalo). La organizantoj pretas renkonti la eŭropajn partoprenontojn en Peterburgo, Moskvo aŭ Bresto, de kie oni aranĝos trajnan vojaĝon tra Rusio, kun halto en Jekaterinburg. Azianojn oni akceptos en Irkutsk, Ĥabarovsk aŭ Vladivostok. Pliajn informojn de Ruslanda Esperanto-Asocio, ✉ ab. jaŝ. 67, R-620077 JEKATERINBURG, ☎ +7 +3432 +23 57 85, fakso: +7 +3432 +51 86 47 «Esperanto» 22 45 01, e-poŝto: vak@ntmk.e-burg.su.

**Svisio:** La kalendaro por 1994 de **Kultura Centro Esperantista**, en La Chaux-de-Fonds, Svisio, haveblas en la sidejo de P.E.A. aŭ senpage el K.C.E. per simpla poŝtkarta peto (✉ Boîte Postale 779, rue des Postiers 27, CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS, ☎ +41 +39 +26 74 07, fakso: +41 +39 +26 62 03). Ĝi enhavas kompletan informojn pri la aranĝoj okazontaj dum 1994 en tiu prestiĝa kaj altnivela esperanta kulturcentro. Krom kulturaj kaj turismaj aranĝoj dum la tuta jaro, ankaŭ UEA-ILEI-ekzamenoj atendas partoprenantojn. Estos prelegoj, kursoj, instrupromenoj kaj seminarioj, kvalite gvidataj de spertuloj pri la traktata temo: Claude GACOND, Andres BICKEL, Tazio CARLEVARO, SMIDÉLIUSZ Katalin, Giorgio SILFER, Fraçois DEGOUL, Alain FAVRE, Mireille GROSJEAN, Andy KÜNZLI kaj aliaj kontribuos al la ĉi-jara programo.

**Brazilo:** Natal, urbo de l'Suno, grava turisma poluso de la brazila nordorienta regiono, fama pro la potencialo de la naturaj belecoj de ties helflavaj dunoj, duonvarmaj plaĝoj kaj tropika klimato, gastigos la 30-an Brazilan Kongreson de Esperanto, de la 10-a ĝis la 15-a de julio, 1994. Krom gastamon de la loĝantaro, tropikan kuirarton kaj tutjaran sunbrilon, vi plue ĝuos sekurecon, komforton kaj la prezojn plej malaltajn en la mondo. Provu vi mem neforgeseblan travivaĵon! Informojn de Asocio Potigvara de Esperanto, Caixa Postal 291, BR-59001-000 NATAL RN.

**Hungario:** La **Internacia Junulara Semajno** (15-21.07.1994) okazos en Kőszeg, belega hungara urbeto apud la limo aŭstra. La urbo havas mezepokan etoson, kiun la programo profitas per multaj kulturaj programeroj pri hungaraj kaj esperantaj tradicioj. Ne mankos la kutimaj amuzaĵoj: balo, ludoj, dancejo, sportprogramoj. Estos ankaŭ ekskurso en apuda belega montaro, kiu estas turisma centro en Hungario. La prezoj estas 150-240 DEM depende de la devenregiono kaj la servoj. ✉ P.f. 262, H-8901 ZALAEGERSZEG, **fakso:** BAKSA Jozsef (IJS) +36 +92 +369 010

Em Alegre Cavaqueira (17):

# O Alfabeto e as 16 Regras Fundamentais da Língua Internacional Esperanto

**Autor:** Ludwik Lejzer ZAMENHOF **Tradução e Notas:** João Santos

## A. ALFABETO

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz.

**OBS.:** As tipografias que não possuam as letras ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ podem, em vez delas, usar ch, gh, hh, jh, sh, u.

## B. REGRAS ([1])

**1 (15)** As palavras ditas 'estrangeiras', isto é, aquelas que a maior parte das línguas receberam da mesma fonte, são usadas em esperanto sem modificação, recebendo apenas a ortografia desta língua. Quanto às diversas palavras do mesmo radical, porém, será melhor usar, sem modificações, apenas a palavra fundamental, formando as outras a partir desta última, segundo as regras do esperanto.

**2 (9)** Cada palavra é lida como é escrita.

**3 (10)** A sílaba tónica é sempre a penúltima.

**4 (2)** Os substantivos têm a terminação "*o*". Para formar o plural, acrescenta-se ainda um "*j*". Existem apenas dois casos: nominativo e acusativo. Este último faz-se a partir do nominativo, pela junção da terminação "*n*". Os restantes casos ([2]) exprimem-se com a ajuda de preposições: o genitivo por "*de*"; o dativo por "*al*"; o ablativo por "*per*" ou por outras preposições, conforme o sentido.

**5 (16)** A vogal final do substantivo e a do artigo podem ser elididas e substituídas pelo apóstrofo.

**6 (5)** Pronomes pessoais:

| **Pessoa** | **Género** | **Sing.** | **Plu.** |
|---|---|---|---|
| Primeira | — | *mi* | *ni* |
| Segunda | — | *vi* | *vi* |
| Terceira | Masculino | *li* | *ili* |
| " | Feminino | *ŝi* | *ili* |
| " | Neutro ([3]) | *ĝi* | *ili* |
| " | Reflexo | *si* | *si* |
| Indefinido | — | *oni* | *oni* |

Os pronomes possessivos formam-se acrescentando aos pessoais a terminação do adjectivo. A declinação é igual à dos substantivos.

**7 (3)** Os adjectivos terminam em "*a*". Em número e caso seguem as regras dos substantivos. O comparativo faz-se por meio da palavra "*pli*", o superlativo com "*plej*". Para estabelecer a comparação usa-se a conjunção "*ol*".

**8 (1)** Não existe artigo indefinido. Existe apenas o artigo definido "*la*", igual em género, número e caso. Obs.: O artigo é usado como nas outras línguas. As pessoas que tenham dificuldade no uso do artigo, podem inicialmente omiti-lo.

**9 (4)** Os numerais fundamentais são os seguintes:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | *unu* | 6 | *ses* | 100 | *cent* |
| 2 | *du* | 7 | *sep* | 1000 | *mil* |
| 3 | *tri* | 8 | *ok* | | |
| 4 | *kvar* | 9 | *naŭ* | | |
| 5 | *kvin* | 10 | *dek* | | |

Não se declinam.

As dezenas e centenas são formadas pela simples aglutinação dos numerais.

Para obter os numerais ordinais, basta juntar a terminação do adjectivo.

Para os multiplicativos usa-se o sufixo "*obl*", para os fraccionários o sufixo "*on*", para os colectivos o sufixo "*op*", para expressar a distribuição usa-se a preposição "*po*". Além do exposto, podem-se usar numerais substantivos e adverbiais.

**10 (7)** Os advérbios terminam em "*e*". Os graus de comparação funcionam como os dos adjectivos.

**11 (12)** Ao usar-se uma palavra que expresse negação, não se usa a palavra "*ne*".

**12 (6)** O verbo não se modifica em pessoa nem em número.

As formas verbais têm as seguintes terminações:

| | | | |
|---|---|---|---|
| presente .. | "*as*" | condicional .. | "*us*" |
| passado ... | "*is*" | imperativo ... | "*u*" |
| futuro ...... | "*os*" | infinitivo ...... | "*i*" |

Os particípios (com sentido adjectivo ou adverbial) terminam em:

| | | | |
|---|---|---|---|
| activo presente . | "*ant*" | passivo presente .. | "*at*" |
| activo passado .. | "*int*" | passivo passado .. | "*it*" |
| activo futuro ..... | "*ont*" | passivo futuro ..... | "*ot*" |

Todas as formas da passiva são construídas com o auxílio da forma correspondente do verbo "*esti*" mais o partícipio passivo do verbo necessário. A preposição da passiva é "*de*".

**13 (8)** Todas as preposições exigem o nominativo.

**14 (13)** Para se mostrar a direcção, as palavras recebem a terminação do acusativo.

**15 (14)** Cada preposição tem um significado definido e constante. Contudo, se devemos usar uma preposição, e o sentido não nos mostre que preposição devemos escolher, usemos então a preposição "*je*", que não tem um significado próprio. Em vez da preposição "*je*", podemos também usar o acusativo sem preposição.

**16 (11)** As palavras aglutinadas são formadas pela simples junção das palavras (a palavra principal fica no fim). As terminações gramaticais são vistas também como palavras independentes.

**NOTAS**

([1]) Esta numeração das regras foi estabelecida pelos gramáticos esperantistas K. Kalocsay e G. Waringhien em *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* (Gramática Analítica e Completa de Esperanto). Os números entre parênteses correspondem à ordenação estabelecida por Zamenhof em *Fundamento de Esperanto* (Fundamento de Esperanto).

([2]) Zamenhof refere-se aos casos existentes noutras línguas, sobretudo nas línguas clássicas, como o latim e o grego clássico. Os alunos que não têm a noção de caso podem negligenciar o último parágrafo da regra número 4.

([3]) Para objectos e animais, como em inglês o "*it*". Note-se que os pronomes pessoais funcionam de forma muito semelhante aos do inglês. ❑

**Aidosprevento per esperanto:**

Kroata Esperantista Junularo, junulara sekcio de Kroatia Esperanto-Unuiĝo, kunlaboras kun iniciata grupo, kies tasko estas fondi Societon por aidosprevento. KEJ kontribuos al la agado kolektante informmaterialon eldonatan de similaj societoj en la mondo, kaj montri ke ankaŭ en tio oni povas utiligi Esperanton. Aŭtune, KEJ planas okazigi internacian seminarion pri aidoso. ✉ Sveti Duh 130, HR-41000 ZAGREB.

INSTRUADO:

# PRI TELEVIDA KURSO...

En *Eventoj* **2/12-93** estis artikolo pri esperanto-kurso de per televido, kie temis pri tri gravaj mankoj, malhelpantaj disvastigi la lingvon per televido: mankoj de mono, tempo kaj profesiaj kunlaborantoj. Jen kelkaj spertoj kaj faktoj, kiujn mi kolektis kiel sekretariino de la projekto TV-kurso.

Internacia Esperanto-Instituto (ILEI) en Hago jam de 3 jaroj esploras eblojn realigi E-instrufilmon, kun jenaj rezultoj — montriĝis, ke ni nepre bezonas:

**a)** kompletan scenaron taŭgan por filmado, do instru-materialon. Ni serĉas ĝin dum du jaroj kaj fine anoncis konkurson, kiun venkis la scenar-propono de KOUTNY Ilona (Hungario) kaj Zbigniew GALOR (Polio);

**b)** profesian reĝisoron kaj filmiston (tiun taskon akceptis Roman DOBRZYŃSKY, Polio);

**c)** buĝeton por scii kiom da mono ni bezonos/havos por almenaŭ komenci la laboron.

Ni havas komencan sumon de 20 000 USD kaj ni ricevis promesojn pri kelkaj malpli grandaj sumoj, sed kun diversaj kondiĉoj (ne ĉiam realigeblaj). Laŭ mia imago, sumo de 20 000 dolaroj estis grandega (se temas pri donaco, certe!), sed montriĝis tute 'mizera', kiam temas pri kostoj de produktado de profesi-nivela instrufilmo taŭga por elsendo en TV!

Esplorante ilin, pere de laborkontraktoj de nia profesia filmisto kaj reĝisoro R. Dobrzyński, montriĝis, ke estas granda diferenco inter amatore plani kaj profesie fari. Temas pri mono (proks. 500 000 USD) kaj tempo (3-4 jaroj). Tio superis niajn eblojn, do ni preskaŭ rezignis.

Flanke de s-ro Dobrzynski tiam venis nova propono: adapti al esperanto jam ekzistantan instru-filmon de BBC por la angla lingvo *Muzzy from Gondoland* kaj *Muzzy comes Back*. Temas pri 180-minuta videofilmo (en du partoj); ĝi estas tre bone prilaborita laŭ didaktika vidpunkto, kaj jam adaptita al kelkaj aliaj lingvoj.

Konsiderante la avantaĝojn (mono kaj tempo) mi/ni venis al la konkludo, ke en nia financa kaj tempa situacio valoras almenaŭ provi, des pli ke la geaŭtoroj de la akceptita scenaro, ĝuste pro manko de tempo ne povis daŭrigi la kunlaboron.

Mi do komencis esplori la opiniojn de esperantistoj, kiuj konas la *Muzzy*-filmon (interalie pere de la komputila reto InterNet). Ricevinte 3 pozitivajn opiniojn de usonano, brito kaj Stefan MacGILL (ILEI), mi petis lian kunlaboron, por adapti ĝin lingve al la jam ekzistantaj scenoj, provante enkonduki en la dialogon e-enhavon. Havante jam profesian helpon por la adaptado de la lingvo, mi petis de s-ro Dobrzyński konkretan projekton kaj buĝeton. Tion mi ricevis lastnovembre.

Laŭ la ricevita projekto montriĝis, ke ĝi estas (laŭ mono kaj tempo) unika ŝanco por ni produkti ion, kio helpos al ni pruvi al la 'ekstera mondo', ke esperanto estas samvalora lingvo kiel ĉiuj aliaj, ĉar la filmo estas jam adaptita al la franca, germana kaj itala. La filmo estas profesi-nivela kaj du reĝisoroj pretas adapti ĝin al niaj lingvaj kaj teknikaj bezonoj, eĉ laŭ niaj financaj ebloj ni esperu, ke tiom da mono — 35 000 USD — ni sukcesos kolekti). Ĝi ankaŭ taŭgas (laŭ teknika vidpunkto) por

uzi ĝin dum TV-dissendoj, sed tiucele ni devos pagi apartan licencon, do la kostoj kreskos.

Resume: se ni ĉiuj kunlaboros en la realigado de tiu projekto, ĉu finance, ĉu labore, ĝi povus (laŭ mi: devus) fariĝi nia vizitkarto, per kiu ni montros la valorojn de nia lingvo, ĝian logikan strukturon, rapidecon lerni kaj tuj komuniki, forigon de antaŭjuĝoj, ke esperanto estas lingvo nur por korespondi inter hobiuloj.

Mankos scenoj el la E-vivo, sed ĝi povas kaj devas fariĝi nia plej bona reklamilo pri la lingvo kaj helpilo por e-instruistoj en la varbado de junuloj kaj infanoj, kiuj devos fortigi niajn vicojn. Plenkreskuloj ofte estas tro okupitaj por lerni ion, kio ne tuj alportas financan profiton; tial infanoj kaj junularo estu nia celo.

Mi menciis kunlaboron de ĉiuj, ĉar intertempe mi eksciis, ke ELNA en Usono ankaŭ faris/faras esplorojn por produkti instrufilmon, ke Dana E-Asocio posedas monon tiucele (ĉu ili ion faris, ne estas konate), ke aŭstraliaj esperantistoj ion planis (sed ĉu ili havas monon tiucele?), eble pri tio ni ankoraŭ aŭdos. Ni kunlaboras jam kun ILEI kaj havas skriban kontakton kun ELNA.

La novproponita projekto (ni nomu ĝin *Muzzy*-projekto) ne estas tio, pri kio ni revis, sed estas tio, kion ni eble sukcesos realigi, se konsciaj esperantistoj apogos ĝin! Krome, ĝi permesos al ni kolekti diversspecajn spertojn, antaŭ ol ni aliros al la projekto *Espero, nia amo*, verkita de I. Koutny kaj Z. Galor.

Por akcepti financan helpon, funkcias la poŝtbanka ĝirkonto 3653959 je la nomo VR.v.h.IEI, Riouwstraat 172, NL-2585 HW DEN HAAG. Sur la pagilo bv. indiki «por e-TV-kurso». Pri la financa flanko de la projekto respondecas ILEI-estrarano s-ro A. J. Bout.

Ni atendas ne nur financan apogon, sed volonte akceptos ankaŭ raciajn opiniojn de legantoj de Eventoj pri la projekto kaj ties realigo.

**Mila VAN DER HORST-KOLINSKA**
🖂 IEI, Riouwstraat 172
NL-2585 HW DEN HAAG

## *Leterojn al Zagrebo 900-jara*

La plej malnova skriba mencio pri Zagreb, la ĉefurbo de Kroatio troviĝas en dokumento verkita en 1134. Por celebri tiun jubileon, oni organizas multajn iniciatojn, inter kiuj internacian ricevadon de gratul-kartoj kaj -leteroj, kiun prizorgas la esperanta Internacia Kultura Servo (🖂 p.p. 499, HR-41000 ZAGREB, Kroatio). Gratulu do, portugal- aŭ esperant-lingve la 900-jariĝon de tiu urbo, kun kiu 'nia' Lisbono havas ĝemeliĝrilaton.

## *kaj al Samarkando 2500-jara*

Samarkandaj esperantistoj preparas nun du internaciajn letervesperojn: **aŭguste'94**, memore al la 600-jariĝo de elstara astronomo kaj registo Mirzo ULUGBEK (nepo de Tamerlan), kies jubileo celebriĝas ĉi-jare sub aŭspicio de UNESCO; **septembre'94**, memore al la 3-jara datreveno de la sendependiĝo de Uzbekio. Viaj ekspoziciaj kontribuoj (salutleteroj, nacilingvaj artikoloj kaj dokumentoj pri Ulugbek, Uzbekio, k.s.) estos tre bonvenaj kaj ilin la organizantaro rekompencos per uzbekaj suveniroj. 🖂 Samarkanda Esperanto-Klubo, p.k. 76, UZ-703000 SAMARKAND, Uzbekio.

EDUKO

# ekaj bebaj pepoj

Salnevo

Ĉi-artikole mi iom rakontos pri la esperantlingva eduko de Sara, mia 21-monata filineto. Unue konfesindas ke mi ne aparte adeptas denaskismon. Elektinte esperanton memvole kaj plenlibere, mi ne emas ĝin trudi al aliaj homoj, ĉu dekrete, ĉu eduke. Tamen alirezone mi konsciis ke nepre ian lingvon mi devus inokuli al la infano. Se entute inokuli, kial ne esperanton? Post longa hezito, kiu daŭris preskaŭ ĝis la probabla naskotempo, mi opiniigis mian edzinon ĉi-afere, kaj ŝi plene konsentis. Dume ŝian ventrobulon mi jam antaŭe komencis alparoli esperante, kun la celo enetosigi kaj la infanon kaj la patrinon...

Ĉi-punkte dirindas ke kiel metodon mi elektis la mankon de metodo. Same mi aniĝis al neniu asocio aŭ grupo de simil-spertaj gepatroj, ĉar la mentorojn tiuskipajn plejofte karakterizas minimumigaj starpunktoj pri nia lingvo. Ĉio disvolviĝas do nature kaj senĝene, libere kaj petole, kaprice kaj laŭverve. La uzatajn lingvojn difinas la etoso kaj cirkonstancoj. Se temas pri la strikta triopo hejma, mian infanon mi alparolas ĉiam esperante, uzante kiel eble vastan vortprovizon kaj kiel eble sukan esprimaron. Se ĉeestas aliaj familianoj aŭ eksteruloj, plej ofte mi ekuzas la portugalan, por eviti miskomprenojn kaj embarasojn. Konfesindas tamen ke mi sentas min ĝenata kiam mi devas portugalumi kun Sara... Sama sento tamen sturmas min kiam mi alparolas mian edzinon esperante!

Nunaĝe Sara evidentigas saman komprenivon ambaŭlingve. Ŝi ekvortis portugale, ĉirkaŭ la 10-a monato. Unue ŝi ekdiris *ábua* (misformigo de *água*, kiu signifas *akvo*), poste la klasikajn *pai* (*patro*) kaj *mãe* (*patrino*). La unuaj esperantaj 'influoj' aperis post kelkaj monatoj, kiam ŝi komencis apliki la esperantan pluralfinaĵon al portugalaj vortoj. Ekzemple, *papa* (*kaĉo*) iĝis *papai* (pron. *papaj'*)! Ĉi vortuzon tamen ŝi apenaŭ konservas nun. Poste venis inversa interfero, kiam ŝi decidis apliki al esperantaj vortoj la vokalduobligan modelon de portugala beblingvo, simile al *popó* (*aŭto*), *memé* (*ŝafo*) k.a. Tiel estiĝis la vortoj *pepe'* por *papero* kaj *kaka'* por *kato* kaj *kaco*. Cetere ŝi ne distingas inter la vira kaj ina organoj, uzante por ambaŭ la saman *kaka'*, kvankam ŝi komprenas ankaŭ la vorton *piĉineto*... Foje ŝi amuze konfuzas esperantajn paronimojn. Ekz. mi memoras ke iam ŝi fingromontris siajn okulojn demandite pri onklo, kaj eĉ antaŭ nelonge ŝi gratetis la brovojn kiam mi enketis pri bovoj!

Ĉi-aĝe ŝi komplete kaj korekte prononcas nur kvar esperantajn vortojn: *mi*, *mia*, *ne*, *kaj*. Ĉi-lastan ŝi uzas abunde kaj redunde, foje tute kaprice kaj mitralripete, foje por pluigi miajn lulbabilojn, kiam mi iom paŭzas por pripenso, sed plejofte... por nomi sin mem, kiam oni demande gestas al ŝi aŭ al ŝia foto! Ĉi vortuzon, kiu mirigas ĉiujn familianojn, mi emas interpreti jene. Ofte mi demande alparolas ŝin per *kaj Sara?* aŭ *kaj vi?*. Ankoraŭ ne kapabla ŝuŝi aŭ sibli (ekz. el *sapo* ŝi faris *pa*, anstataŭ la atendebla *sa*, kaj el *ŝuo* ŝi kreis *ku*), ŝi prenis la pli facilan kaj elvokivan vorteton por nomi sin mem, kaj ĝin ĉiam konsekvence uzadas tiusence. Jen plia konfirmo pri la elvokiveco kaj kontaĝemo de ĉi helendevena vorteto, kiu ofte entrudiĝas en miajn



frazojn kiam mi devas paroli angle. Mi memoras ankaŭ, el la jubilea 1987, similan interferon fare de sperta pola esperantisto, kiam li, en krakova parko, parolante pollingve al gaĝa publiko dum subĉiela IJK-programero, enŝutis amason da *kaj* en sian oratorajon, laŭ atentigo de mia pola amiko Marek Komorovski, kiu apude ĉeestis! Tamen en la pratempo de esperanto, nur kelkajn monatojn post apero de la epokfara *Unua Libro*, Zamenhof ricevis leteron de ekadepto, kiu laŭdegis la novan lingvon kaj promesis ĝin ellerni, kondiĉe ke oni forĵetu ĝuste la vorteton *kaj*, lau li malplaĉan kaj arbitran! Kiel kutime, la iniciatoro paciencis longe artikoli pri tiu kaj similspecaj ŝiboletoj, sur la julinumeraj paĝoj de *La Esperantisto*, en 1891 (p. 49), sub la ĝenerala titolo *Ŝanĝotaĵo*. La *kaj*-koncerna parto de tiu disertaĵo eterniĝis poste en lia fama kolekto de *Lingvaj Respondoj*, kiel atesto pri la frutempa saĝo samideana...

Krome, Sara uzadas plurajn unusilabaĵojn spureble esperantajn, kvankam foje ne facile disigeblas interferoj de portugalaj ekvivalentoj, paronime samsignifaj. Plejofte temas nur pri la akcentita silabo, foje kripligita. Jen do ŝia plurfunkcia *po* (*supo*, *pomo*, *siropo*, *pano*, *terpomo*, *pordo*, *ĉapo*, *ombrelo*!), *ku* (*okulo*), *ko* (*forko*), *ka* (*kalsono*), *mo* (*maro*, *mano*), *pu* (*tuko*), *ro* (*horloĝo*), *pi* (*pilko*, *pli*, *birdo*), *kro* (*karoto*), *gro* (*jogurto*), *bi* (*biskvito*), *ne* (*nazo*), *bu* (*buŝo*) i.a.. Jen vera feniksa versio de volapuko! Menciindas ankaŭ kelkaj plursilabaĵoj — *titi'* (*ĉi tie*), *nana'* (*banano*) i.a. — kaj la miksvorto *pia*, vokala hibrido de la esperanta *piro* kaj de la portugala ekvivalento *pêra*. Iom mirige, ŝi ne plu aplikas la du unuajn esperantajn vortojn de ŝi lernitajn: *tri* kaj *ĵi* (*ĝis*)...

Alia grava aspekto de plurlingva edukiĝo koncernas la ekuzon de malsamaj formoj por sama koncepto. Sara jam ekiris tiun stadion. Unuafoje ŝi montris tiun kapablon ĉirkaŭ la 17-a monataĝo, kiam ŝi ekaplikis la vorteton *pi* por nomi sian etan pilkon, kvankam ŝi jam tiutempe uzadis — kaj plu uzadas — la unusilabaĵon *bo* (el la portugala *bola*) por indiki la saman objekton. Poste ŝi ekuzis samtempe la vortetojn *pi* kaj *mai* (el la portugala *mais*) por diri *pli*. Tre utila municio kiam temas pri manĝ- aŭ ludhoroj! La du vortetojn ŝi uzadas indiferente kaj preskaŭ samofte, alparolante jen paĉjon, jen panjon, ĉar ŝi ankoraŭ ne konscias ke temas pri du 'lingvoj'. Tamen kiam ŝi diras al mi *mai*, mi ŝajnigas nekomprenon kaj demandas *kion?* aŭ lipe ekgestas la elparolon de *pli*. Tiam ŝi tuj ekdiras *pi!*, kaj mi reagas manĝige aŭ plulude. Preskaŭ

same ŝi aplikadas la utilan *ne!* kaj la portugalan ekvivalenton *não!*. Ĵuse ŝi ekuzis ankaŭ *bi* por diri *biskvito*, post longa kaj pena ekzercado — ŝi ja ĉiam spitis miajn 'lecionojn' kaj uzadis nur *abu* (el la portugala *a bolacha*)! Nun ŝi aplikas ambaŭ formojn, sed iom aliel ol pri *mai* kaj *pi*. Efektive, dum pluraj monatoj ŝi uzadis nur la portugalan formon, kaj do ŝi ĉiam preferas ĝin unuapafe. Tamen se ŝin trafas manko de reago miaflanka kaj la dezirata biskvito ne venas, tiam ŝi atentas miajn lipojn kaj ekkriĉas *bi!*. Konklude, kiam ŝi scipovas duoblajn formojn, la esperantajn ŝi ekuzas nur en okazoj de vera bezono! Jen lingvokoncepto pure utilisma, same respektinda kiel la idealisma(j)...

Estonta evoluo de la escipovo de Kaj — pardonu! de Sara — dependas ĉefe de tio, ĉu mi plue kapablos dediĉi ĉiutagajn temperojn al ŝia eduko, aŭ ĉu male tion sufokos familiaj cirkonstancoj, aliiĝo de miaj laborkondiĉoj kaj dejorhoroj, aŭ kreskanta premo de portugallingva medio, kiu nun konturiĝas nur familie kaj varteje, sed poste — lerneje, amikare, adoleske, amindume, vivbole... Ĉu esperanto eltenos tian konkuron?❑

## LIBRO-SERVO:

*En tiu ĉi listo, vi trovos la kodojn, titolojn kaj prezojn de la libroj ekvendotaj en nia Libro-Servo ekde la lasta informo en* Nia Bulteno *62*.

| | | |
|---|---|---|
| 00.008 | Kasedo: *Aŭdu kaj lernu*, Sylla Chaves | 2400$00 |
| 01.016N | *Gramática completa do Esperanto*, G. Mattos | 2000$00 |
| 01.078 | *Noveau Cours d'Espéranto*, E. Ludŭig & R. Triolle | 1800$00 |
| 02.027N | *Esperantaj Sinonimoj*, J. Ojalo | 1250$00 |
| 04.003 | *Historiaj Studoj*, E. Drezen | 1100$00 |
| 05.004N | *Postkursaj Legaĵoj*, V. Oljanov & N. Janev | 500$00 |
| 08.006 | *Malfacilas esti Dio*, A. & B. Strugackij | 1500$00 |
| 08.128 | *Kompreni*, G. Neves | 600$00 |
| 09.003 | *Ibere Libere*, G. Neves & J. Kamaĉo & M. Fernández & L. Dek | 2500$00 |

## ABONOJ:

*La ĉi-suba listo montras la abonprezon de kelkaj periodaĵoj, por la jaro 1994. Bv. rimarki, ke aperas nur tiuj, kies eskuda prezo estas jam kalkulita aŭ konata.*

| | |
|---|---|
| *La Domo — Jarcento 21* | 4000$00 |
| *El Popola Ĉinio* | 4100$00 |
| *Esperantista Vegetarano* | 2500$00 |
| *Espero Katolika* | 5000$00 |
| *Eventoj* | 6200$00 |
| *Fonto* | 4500$00 |
| *Heroldo de Esperanto* | 3000$00 |
| *Internacia Pedagogia Revuo* | 2400$00 |
| *Kulturaj Kajeroj* | 2800$00 |
| *Literatura Foiro* | 5000$00 |
| *La Jaro* | 880$00 |
| *La Ondo de Esperanto* | 1750$00 |
| *Monato* | 4900$00 |
| *Norda Prismo* | 2700$00 |
| *Rok-Gazet'* | 3500$00 |
| *Spektro* | 1100$00 |
| *Ruslanda Esperantisto* | 1400$00 |

***Indas memorigi ke, krom tiujn ĉi-suprajn periodaĵojn, eblas aboni multajn aliajn, kiel unua (aŭ sola...) portugala abonanto, kalkulinte la eskudan prezon. Vi povas konatiĝi kun la plej freŝaj numeroj de multegaj, abonindaj titoloj el la esperanta gazetaro en nia sidejo, kie ili estas konstanta ekspozicio.***

# Portugalaj Leteramikoj

zorge de Ĝina

*Saluton, mi esperas ke vi fartas bone. Ni komencas kun leteramikoj por la pli junaj esperantistoj.*

Se vi ŝatas gimnastikon kaj Japanion vi povas skribi al **Aurore**, 12-jaraĝa knabino el Francio. Skribu al: Aurore LAFFONT, Ch. Vert Coteau 4, F-09700 SAVERDUN, FRANCIO.

Se vi havas inter 9 kaj 13 jarojn vi povas skribi al **Mickael**, knabo ankaŭ el Francio. Lia adreso: Mickael TELLEZ, rue D. Papin 28, F-09600 LAROQUE D'OLMES, FRANCIO.

El Zairio ni ricevis leteron de **Phoba di Lenzo**, studento kiu deziras korespondi kun portugalaj esperantistoj por trovi amikojn kaj ankaŭ por lerni la portugalan lingvon, kiun li tre ŝatas. Li havas 18-jarojn kaj lia adreso estas: Phoba di LENZO, Lycée Mbuetete ya M'bu, Boîte Postale 52, Muanda-Ville, Muanda, Bas-Zaïre, ZAIRIO.

**Cristina** skribis el Brazilo kaj volas korespondi kun gestudentoj por interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn, kaj nature, por trovi novajn amikojn. Skribu al Cristina Cruz dos SANTOS, Avenida Comendador Franco 7313 bl. 3B ap. 2, Bairro Uberaba, BR-81560-000 CURITIBA PN, BRAZILO.

**Johan** tre ŝatas motorciklojn, kaj deziras korespondi kungejunuloj inter 13 kaj 18 jaroj pri diversaj temoj, sed precipe pri... motorcikloj. Skribu al: Johan PORTES, Av. Halte 24, F-09340 VERNIOLLE, FRANCIO.

**Marko** ŝatus korespondi por ekkoni portugalajn esperantistojn kaj por interŝanĝi librojn, revuojn, ktp. Li ankaŭ volas lerni la portugalan lingvon, kaj volonte instruos iun kiu volas lerni la polan lingvon. Do, se vi volas lerni la polan aŭ instrui la portugalan, aŭ nur simple interŝanĝi amikecon, skribu al: Marko PIERKIEL, zorge de Agnieszka MROZOWSKA, str. Koscinszki 18/14, PL-7330 Łobez, POLIO.

*En la venonta Leteramikoj vi povos elekti pli da amikoj kaj tiel ekkoni iliajn landojn kaj kulturojn. Do, ĝis baldaŭ!*

Ĝina

## *Kroatio: esperanto-kursoj en bazlernejoj*

La Sekcio de ILEI en Kroatio daŭrigas organizadon de esperanto-kursoj por la junularo. En kvin lernejoj de Zagrebo oni okazigas kurson por bazlernejanoj. Similaj bazlernejaj grupoj (aĝo 8-15 j.) funkcias ankaŭ en aliaj urboj: Gospic, Zupanja, Koprivnica. En Zagrebo funkcias unu mezlernejana kaj studenta grupo de KEU/KEJ (Kroata esperanto-Unuiĝo kaj Kroata Esperanto-Junularo). Temas pri la kursanoj kiuj sekvis la kursojn antaŭ pluraj jaroj, kaj pro lernejaj taskoj malaperis el la movado. Nun ili denove renkontiĝas, lernas kune. Pluraj inter ili tre volonte korespondos. Interesatoj povas direkti korespondproponojn ĉu individuajn, ĉu grupajn, al la sekretario de KEU: M. Beloševič, Sveti Duh 130, 41000 Zagreb, Kroatio. Anticipan dankon.

BILETO DE SENBARBULO (6)

# TIA ĜI ESTAS...

La vivon mildigas subitoj, surprizoj kaj hazardoj. Iam ekgutis kaŝita akvotubo en mia necesejo. La muro obstine likis, kaj mi venigis plumbiston. Kiam li enpaŝis hejmen, mia trivita pivo kuŝis surtable, ĉar tiam mi ion elverkis gazeten. Ekvidinte la volumon, li tuj elsilabis la nomon *esperanto* kaj aldone raportis la koincidon, ke tiun saman lingvon scipovas ankaŭ parenco lia ĵus veninta el Sudafriko!

Ne maloftas tiaj mirrakontoj niamovade. Mi memoras similan sperton de eksa kasisto de PEA, en trajna stacidomo Lisbona, kiam li hazarde renkontis blindan loterivendiston kiu glate frazis nialingve, estante membro de neniu asocio ĉi-landa aŭ ekstera.

Ĉu veras la aserto, ke esperantistoj troviĝas ĉie tra la mondo, eĉ preter aŭ trans la magraj ciferoj de kluboj, asocioj, societoj, ligoj, federacioj kaj similaj gregejoj? Ĉi-sekve mi prios alian sperton samfrekvencan. Kvankam nur letera, ĝi eble efikos kvazaŭ pruve.

En la jubilea jaro 1987 (alia koincido!) mia latinista amiko Nicolau Firmino sendis Japanien ekzempleron de sia eldona juvelo. Temas pri latinigo de la poemego *La Luzidoj*, de Camões, fare de la dominikano Clemente de Oliveira (kun prefaco de rivala jezuito!), atinginta ĝis nun du eldonojn (1983 kaj 1988). La valora libro trafis en la manojn de japana profesoro, Eiichiro Tani, fervora adepto de la t.n. *Latinitas viva*, movado kiu celas la enkondukon kaj pluuzon de la latina kiel moderna helplingvo. La ĉefa sidejo de tiu movado situas en Saarbrücken, Germanio, kie aperas la revuo *Vox latina*, verva raportejo pri oftetaj kongresoj, seminarioj, renkontiĝoj aŭ prelegoj (*acroases*) kies sola labor- kaj klaĉlingvo estas la latina. (Eble flustrindas ke tiugazete ne mankas disfojaj pikmencioj pri nia lingvo, kiun ili nomas *esperantum*...).

Ĉi-punkte mi haltu kun la celo iom emfazi du aliajn koincidojn. Unue, samurbe en Germanio sidejas ankaŭ nia literatura-kultura gazeto *Iltis-Forumo*, kiun redaktas Reinhard Haupenthal, kaj samregione viglete aktivas Sarlanda Esperanto-Ligo. Due, en la sudfranca urbo Paŭo loĝis mondfama paro, gesinjoroj Immé, ĉefaj korifeoj de *Latinitas viva*, kiuj interkonatiĝis pere de ĉi lingvo kaj ĝin ĉiam flue uzadis hejme. (Vera konkurenco al nia *edzperanto*!). Nu, ĝuste dank' al la varb-klopodoj de s-ino Immé, dume vidviniĝinta, oni inaŭguris tiuurbe en 1991 monumentan marmor-tabulon al la latina lingvo, kun i.a. jena surskribo: *LATINE . LOQVERE . VT . CIVIS . TERRARVM . HABEARE* («Parolu latine, por ke oni vin taksu mondcivitano»). Kiel ĉefan argumenton en sia pledado por la latina ŝi uzis la fakton, ke antaŭ tri jaroj oni inaŭguris en skvaro samurba monumenton... al esperanto! Ja, ankaŭ tie viglas grupeto nialingva...

Returne al la japana profesoro, mi diru ke, leginte lian latinlingvan dankleteron al la eldonisto Nicolau Firmino, mi tuj ekideis proponi al li korespondadon (*commercium epistulare*) en la Cicerona idiomo. Dirite, farite. Li akceptis, kaj la afero glate disvolviĝis dum kelka tempo. Krom la klasikaj kaj modernaj lingvoj, li marotis ankaŭ la botanikon, historion, geografion, etnologion kaj buntan amaseton da aliaj aferoj. Ne mankis eĉ mencioj pri faduo, kino kaj

komiksoj...

Iuletere mi decidis anonci mian esperantistecon. Tiucele mi ekuzis hiperbolan esprimon iam proponitan en latina kongreso kiel ekvivalenton de 'lingvo internacia': *lingua aptissima ad colloquia ducenda inter homines sermone patriaque diversos, quae vulgo "esperanto" nuncupatur* (lingvo taŭga por interparolo inter homoj diversnaciaj kaj dislingvaj, kiun nelatine oni nomas *esperanto*). Parenteze dirindas ke tian plurklaftan esprimon advokatas nur unu partio de la movado *Latinitas viva*, kiu pledas por pura lingvaĵo, Cicerone odora, sena je neologismoj. Alia frakcio adeptas neolatinismojn kaj eĉ neologismojn ĉerpitajn el modernaj lingvoj (ekz. *pistolium*). Ĉi-lastaj ne maldegnus diri *lingua internationalis*.

Nu, respondletere Eiichiro Tani surprizis min per trafaj diroj pri esperanto, kiun li nomis jen *lingua Zamenhofiana*, jen, iom neglekte, *lingua commenticia* (artefarita lingvo). Li rakontis i.a. ke esperanton li eklernis pro amo al sia patro (*pietatis causa*), longe malsana litkuŝe, ĉar ties lasta konsolo estis korespondadi tutmonde, kvankam la maljunulo scipovis nur la japanan. Tiucele Eiichiro dum ok jaroj konstante uzadis la zamenhofan kiel pontlingvon, esperantigante la leterojn de sia patro kaj japanigante la respondojn de ties korespondantoj. Pri esperanto li ne plu okupiĝis post la morto de sia patro, sed mi ne povas ne emfazi ke li, profesoro i.a. pri la angla kaj franca en la altlernejo de Nara-City, elektis ĝuste nian lingvon kun la celo korespondadi tutmonde, kvankam li ĝin ne adeptis!

Tia ĝi estas, nia lingvo marota. Iom bizara, sed ne tiom rara... **Salnevo**

TRADUKKONKURSO

*La ĉi-suban soneton verkis portugallingve Alsácia Fontes MACHADO dediĉe al sia amiko José Augusto PIMENTEL, kaj estis publikigita en 1990.11.19 en* Gazeta das Caldas*:*

# Incógnita

Sou forasteira, aqui, sem pedra ter ou lenho
em que repouse a fronte incendiada,
não sei para onde vou, nem de onde venho,
não sei se é longe ou breve a caminhada.

Não sei se me pertence o que aqui tenho,
árvore velha às rochas arrancada,
bronze quebrado com que não me empenho
sendo o que sou prefiro não ter nada.

Serei santa talvez, talvez presságio,
dum incontível orbe a expansão,
em estilhaços lunares submerso.

Espuma gigantesca dum naufrágio,
fragmento do cosmo em suspensão
a lucilar na orla do Universo.

*Omaĝe al tiu ĉi karmemora kaj elstara membro de nia komunumo, NB organizas tradukkonkurson de la ĉi supra soneto. Konkursaĵoj ricevitaj ĝis la 1994.06.17 — la 81-a datreveno de ŝia naskiĝo — estos submetitaj al la takso de du eminentaj portugal- kaj esperant-lingvaj poetoj — Leopoldo KNOEDT kaj Geraldo MATTOS. Ĉiuj konkursaĵoj kaj la ĵuria laŭro publikiĝos en* NB***64***.

**PLEJA ESPERANTO-ROK'!**

Vinilkosmo, esperanta rokmuzika eldonejo, lanĉos baldaŭ la albumon *Vinilkosmo-kompil'*, kiu enhavos la plejbonon de la nuna esperanta roko. Antaŭmendi (kasedon aŭ kompaktdiskon) tre favorpreze eblas ja el la P.E.A.-Libro-Servo. ☺ Ne maltrafu ĉi-ŝancon!

OPINIO

# *Opinio de Malsamideano*

Kiam Zamenhof kreis Esperanton, liaj vivkondiĉoj igis lin kredi ke se ĉiu popolo parolus la saman lingvon ne plu milito ekzistus. Admirinda bonkora homo li vere estis, sed ni bone komprenas hodiaŭ kiom erara kaj utopia lia revo estis.

Kiam, dudekjaraĝa, mi lernis Esperanton, kun la naiveco kaj entuziasmo junecaj, mi tuj adoptis la lingvon kaj la ideon, mi iĝis samideano.

Multaj jaroj pasis, mi kaj la lingvo maturiĝis kaj maljuniĝis. La kredo je socia pacemo per parolado de komuna lingvo tute jam ne estas akceptebla. Esperantisto mi daŭre estas, ĉar mi parolas Esperanton, sed samideano mi ne plu povas resti.

Pro tio ne plaĉis al mi tio, kion mi vidis kaj aŭdis dum la Zamenhof-festo ĉe la Spegula Salono:

Oni daŭre proponas Esperanton kiel la dua lingvo [tiel] de ĉiu popolo. Oni daŭre prezentas Esperanton kiel kultura kaj literatura lingvo [tiel]; kaj daŭre ricevas viglan kontraŭstaron de la nacilingvaj doktoroj.

Ŝajnas ke jarcenta batalo estas sufiĉe pruvinta la malsukceson de tiu maltaŭga vidpunkto. Esperanto ne ŝajnas esti la taŭga vojo por disvastigi naciajn kulturojn. Lasu al naciaj kulturistoj siajn proprajn aferojn. Se iu ajn volas studi Camões aŭ legi Pessoa, tiu devas lerni la portugalan, ĉar por traduki artaĵojn oni bezonas esti pli bona artisto ol la originala. Kial ni, esperantistoj, devas preni, kontraŭ la volo mem de la naciaj doktoroj, la malfacilan taskon de disvastigi [tiel] naciajn literaturojn?

Ne devas la esperanto-movado intermiksiĝi kun naciaj organizoj kaj interesoj. Mi kredas ke tio estas la vera kialo de malvolemo kontraŭ Esperanto kiel lingvo internacia en si mem. Tion mi klare rimarkis en la paroladoj de la doktoroj ĉe la Spegula Salono. Oni akre rimarkigis ke Esperanto estas apenaŭ [tiel] unu inter centoj.

Por esti lingvo internacia oni ne postulu ke ĝi estu la dua, la tria aŭ la kvara lingvo de iu ajn popolo. Internacia lingvo kun strukturaj kondiĉoj kiajn Esperanto havas, estas utila ilo de interkompreno por inteligentaj homoj de malsimilaj parolmanieroj. Ĝi ne bezonas nek devas esti devigata en iu ajn lernejo aŭ nacio. Anstataŭe, ni esperantistoj nepre devas igi Esperanton persone alloga, per facileco de lernado kaj per utileco de uzado.

Estante membro de Pasporta Servo, mi kredas ke ĝi estas ekzemplo de aktiva kaj utila maniero por disvastigi la uzon de Esperanto. Per kontaktoj kun eksterlandanoj ni povas pruvi la utilecon de lingvo tiel facila kaj komunikpova.

Se Esperanto ankoraŭ ne estas sufiĉe facila, ni korektu ĝin. Nur tiuj, kiuj klopodis instrui la lingvon kreitan de Zamenhof, povas ekvidi kiom da malfacilaĵoj ĝi ankoraŭ havas. La Universalaj Kongresoj, anstataŭ kompliki la lingvon por fari el ĝi literaturan ilon, devus klopodi faciligi ĝian lernadon, forŝirante kiel eble la multajn malfacilaĵojn.

Ni pli honorigus la Zamenhofan memoron per vivigado de lia verko ol farante el li unu pluan rigidan dion.

Se iam la esperantmovado komprenos tion kaj agados tiucele, mi denove estos samideano. Ĝis tiam mi restos kora kaj parolema esperantisto.

**Américo do Carmo VIEIRA**

RAKONTO:

# *Fablo de la Kofro de la Nepoj*

*(trilogio)*

**1-A PARTO**

Iam estis du internaj maroj.

Unu, malavara, ricevinte grandan riveran akvokvanton, fordonadis ĉiun guton donacitan al ĝi de la Kreinto. Tiel, ade fariĝis fluo el pura kaj kristala akvo; kie la fiŝoj estis el oro, kaj la vivo riĉabunda.

La alia, avara, sorbadis la tutan akvon ĝentile ceditan al ĝi de la Kreinto. La stagno provokadis la morton al la fiŝoj, kaj ties nemoveblaj akvoj estis fetoraj.

La unua el ĉi tiuj maroj nomiĝas Maro Galilea, la dua, Maro Morta. La akvoj estas ja la samaj, tiuj de la rivero Jordano, kiuj antaŭ du mil jaroj estis karesataj de la Majstro.

**2-A PARTO**

Iam estis du cirkvitoj.

En la unua, ĉio estis harmonio. La elektronoj, feliĉaj, saltetis de orbito al orbito, laborante tiom kiom oni ilin petis. Estis leĝo en tiu cirkvito: tiu de la fordono. Ĉiu estaĵo de tiu mondo fordonis kaj fordonis... Ju pli fordonis, des pli abunde ricevis. Kaj ja la kurento fluis plena je vivo.

En la alia cirkvito, la socio ankoraŭ lernis esti cirkvito. Io estis erara. La cirkvito ne estis tio. Ĝi ne estis pli ol impulso volanta esti kurento. La elektronoj, timigitaj, ne laboris, ne saltetis ĝoje de orbito al orbito. Ili stagnis kiel la akvoj de Maro Morta. Kaj la elektro ne estiĝis.

**3-A PARTO**

Estis iam du aŭtomobilaj muntlinioj: la fabriko de aŭtomobiloj A, kaj la fabriko de aŭtomobiloj B.

En la fabriko de aŭtomobiloj A, ĉiu laboristo okupiĝis jene: ili donis la pecon kiun la apuda kolego bezonis por ke la aŭtomobilo plue muntiĝu. La aŭtomobiloj fluis abunde.

En la fabriko B, la laboristoj estis avaraj. Ĉiu pensis ricevi de la kolego la necesan pecon por la muntado, sed tiel malofere ili don-ne-donis la produkton de sia laboro al la sekva kolego, ke okazis ofte rompiĝoj en la flueco de la fabrika vivo, kaj neniu estis feliĉa.

Kelkaj laboristoj ekkomprenis la mekanismon de la fabriko, kaj la produktado pliboniĝis. Tiuj estis la ununuraj kiuj fakte laboris. Unue ili efektivigis sian propran taskon, poste, iom post iom, lacaj sed feliĉaj, ekhelpis la aliajn. Ju pli ili laboris, des pli feliĉaj sin sentis. Ju pli feliĉaj, des pli laborvolaj kaj lertaj. La aliaj, tre lante, kvazaŭ vekiĝantaj el miljara dormo, ekkomprenis kaj kunlaboris. Tiel, en la fabriko de la aŭtomobiloj B, la homoj iĝis tiel feliĉaj, kiel tiuj de la fabriko A.

**KONKLUDO**

Kaj iam diris Jesuo (Mt. XI, 28/3 — rekte traduke el la helena far la aŭtoro):

«Venu al mi ĉiuj, kiuj estas lacaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi mem vin ripozigos. Levu mian jugon sur vin, kaj lernu el mi, ĉar mi estas milda kaj humila en la koro, kaj vi trovos la ripozon por viaj animoj; ĉar mia jugo estas bonfara kaj mia ŝarĝo estas malpeza.»

***Johano Santo***
***Lisbono, oktobro 1993***

# ...QUOTA$!...

Nunca é demais recordar: Somos uma instituição sem fins lucrativos que financeiramente depende em grande medida das quotizações dos seus associados. Assim, o constante apelar e recordar para a liquidação de montantes em atraso e para o pagamento atempado (e, se possível, antecipado...) é um mal necessário. Cá está ele:

Cada sócio é informalmente relembrado do mês referente à sua última quota paga através da cinta de morada que envolve o *Nia Bulteno*: Um número de quatro algarismos impresso acima da morada, à direita indica mês e ano da última quota paga (p.ex., "9412" significa "Dezembro de 1994"). Se o mês indicado for o memo em que foi efectuada a inscrição, então nenhuma quota foi ainda paga. Para calcular o montante a pagar, o número de meses eventualmente em atraso deve ser multiplicado pela quota mensal — actualmente valendo 150$00, reduzida a 100$00 para sócios reformados e menores de 18 anos.

Relembramos que esta informação é informal e oficiosa, não valendo como recibo ou factura. Por quaisquer erros (que serão despistados pela tesouraria no acto de registo do pagamento) pedimos antecipadamente que nos desculpe e informe.

Através deste sistema, foi possível já regularizar muitas situações de quotas em atraso devidas a distracção por parte do sócio. Em 1994.05.16, a Associação Portuguesa de Esperanto contava com 253 sócios, dos quais 107 com a quotização regularizada (isenta ou paga pelo menos até Maio), tendo já 5 sócios pago o ano de 1995 e mesmo um sócio pago até 1998! Dos restantes 146 sócios mais metade pagou até Maio (*exclusive*), estando os outros pagamentos mais atrasados (1987 a 1992). Se for este o seu caso, não deixe de proceder ao pagamento; por cheque, numerário ou vale postal.

Está previsto para 1995 ou 1996 um aumento da quota mensal para 200$00.

**MONATTRIA—TRIMESTRAL**